PREĜOSEMAJNO
POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

# Justecon, justecon sekvu

*(Readmono 16,11-20)*

18. - 25.01.2019

IKUE
Romo/Zagrebo, januaro 2019

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:
- Uilso Aragono, Mata De Prata, Brazilo
- Alberto García Fumero, Ciudad de La Habana, Kubo
- Antonio De Salvo, Guidonia, Italio
- Bernard Schwaiger, Arnstadt, Germanio
- Daniel Chevalier, Ecquevilly, Francio
- Sac. Gabriel Anda, Edea, Kamerunio
- Giovanni Daminelli, Sesto S. Giovanni, Italio
- Im Hamu, Seoul, Koreio
- Marija Belošević, Zagreb, Kroatio
- Mike Leon, Lower Hutt, Novzelando
- Milton Lacerda, Santos, Brazilo
- Paola Birgit Giommoni, Arezzo, Italio
- Cristian Mocanu, Deva, Rumanio
- Pavol Petrik, Pečovská Ves, Slovakio
- sac. Serhij Prutko, Kievo, Ukrainio
- Veronika Kirsch, Szekszárd, Hungario
- Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos, Serra (Espírito Santo), Brazilo

Reviziis: Antonio De Salvo

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija Belošević

*La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)*

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
Via di Porta Fabbrica 15
IT-00165 ROMA RM, Italio

ikue@ikue.org
ikue.reto@gmail.com
www.ikue.org
www.esperokatolika.org
Fejsbuko de IKUE: goo.gl/Vv21BD
groups.yahoo.com/group/ikue/
www.radio-vatikana-esperanto.org
www.fontoj.net

Estimataj,

En la manoj la sepan jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de deksepopo de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco (Brazilo, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kamerunio, Koreio, Kroatio, Kubo, Novzelando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio).

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?

Mi deziras memorigi al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero, Lillo, Nitro kaj Lisbono, kaj ĉiujtagaj preĝoj dum la Ekumenaj E-kongresoj en Trento kaj Strasburgo.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo.

Ne forgesu, ĉi jare okazos la Ekumena Esperanto-Kongreso.

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18-a kaj 25-a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas. Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Pacon kaj bonon!

Marija Belošević,
vicprezidantino de IKUE

# BIBLIA TEKSTO POR LA JARO 2019

## Justecon, justecon sekvu

*(Readmono 16,11-20)*

Kaj estu gajaj antaŭ la Eternulo, via Dio, vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj via servantino, kaj la Levido, kiu estas en viaj pordegoj, kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas inter vi, sur la loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio, por loĝigi tie Sian nomon. Kaj memoru, ke vi estis sklavo en Egiptujo; kaj observu kaj plenumu ĉi tiujn leĝojn.

Feston de laŭboj faru al vi dum sep tagoj, kiam vi kolektos el via draŝejo kaj el via vinpremejo. Kaj estu gajaj en via festo, vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj via servantino, kaj la Levido kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas inter viaj pordegoj. Dum sep tagoj festu al la Eternulo, via Dio, sur la loko, kiun elektos la Eternulo; ĉar benos vin la Eternulo, via Dio, en ĉiuj viaj produktaĵoj kaj en ĉiuj faroj de viaj manoj, kaj vi estos tute gaja.

Tri fojojn en la jaro ĉiu via virseksulo devas aperi antaŭ la Eternulo, via Dio, sur la loko, kiun Li elektos: en la festo de macoj kaj en la festo de semajnoj kaj en la festo de laŭboj; kaj li ne aperu antaŭ la Eternulo kun malplenaj manoj; ĉiu kun donaco en sia mano, konforme al la beno de la Eternulo, via Dio, kiun Li donis al vi.

Juĝistojn kaj kontrolistojn starigu al vi en ĉiuj viaj urboj, kiujn la Eternulo, via Dio, donos al vi laŭ viaj triboj; kaj ili juĝu la popolon per juĝo justa. Ne klinu la leĝon, ne atentu personojn; kaj ne prenu subaĉeton, ĉar subaĉeto blindigas la okulojn de saĝuloj kaj konfuzas la aferojn de justuloj. Justecon, justecon sekvu, por ke vi vivu kaj posedu la landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.

# ENKODUKO AL TEMO POR LA JARO 2019

Ĉiujare kristanoj tra la mondo unuiĝas preĝe por la kreskado de la unueco. Ni faras tion en la mondo, kie korupto, monavideco kaj nejusteco kuntrenas malegalecon kaj dividon. Nia preĝo estas preĝo por la unueco en mondo frakasita: kaj tio estas ago potenca. Sed tamen, kiel individuoj kaj komunumoj kristanaj, ni kelkfoje estas komplicaj en nejusteco kaj, pro tio, ni estas kunvokitaj doni kune ateston favore al la justeco kaj esti iloj por la resaniĝanta graco de Kristo antaŭ la frakasoj de la mondo.

La Preĝsemajno por la Unueco de Kristanoj en 2019 estas preparita de la kristanoj en Indonezio. Kun 265 milionoj da homoj, el kiuj 86% konsideras sin kiel islamanojn, Indonezio estas bone konata kiel la lando, kiu havas la plej grandan popolon islaman. Sed tamen, 12% el la indonezianoj estas kristanoj el variaj tradicioj. Se oni konsideras kaj la popolon kaj la grandan amplekson de tero, Indonezio estas la plej granda lando en sudokcidenta Azio. Ĝi havas pli ol 17.000 insulojn, 1.340 malsamajn etnajn grupojn kaj pli ol 740 tieajn lingvojn, sed eĉ tiel ĝi estas kunigita en ties pluraleco per la nacia lingvo *Bahasa Indonezia*. La lando baziĝas sur kvin principoj nomataj *Pankazila* [1], kies moto estas *Bhineka Tunggal Ika* (Unueco en la Diverseco). Meze de la diverseco de etnoj, lingvoj kaj religio, la indonezianoj estas vivintaj per la principo de *gotong rojong*, kio estas vivi en solidareco kaj kunlaborado. Tio signifas specon de komuneco en diversaj kampoj de vivo, en laboro, en malĝojoj kaj en festadoj, rigardante ĉiujn indonezianojn kiel fratojn kaj fratinojn.

Ĉi tiu ĉiam malfortika harmonio estas hodiaŭ minacata en novaj manieroj. Tre multe el la ekonomia kreskado, kiun Indonezio estas spertinta dum antaŭnelongaj jardekoj, estas konstruita per sistemo centrita en konkurenco. Ĉi tio alfrontas rekte la kunlaborecon antaŭvidintan per *gotong rojong*. La koruptado estas spertita multmaniere kaj infektas la politikon kaj la entreprenojn, ofte donante ruinigajn konsekvencojn por la medio. Aparte, la koruptado malfortigas la justecon kaj la leĝaplikadon. Tre ofte, kiuj devus supozeble promocii la justecon kaj protekti la malfortulojn, tiuj faras ĝuste la malon. Konsekvence, la distanco inter riĉuloj kaj malriĉuloj grandiĝas kaj, tiel, lando tiom riĉa pri mediaj rimedoj havas la skandalon de multaj homoj vivantaj en malriĉeco. Okazas laŭ la tradicia indonezia proverbo: „Muso mortas malsate ene de grenejo rizplena“. Dume, apartaj etnaj kaj religiaj grupoj estas ofte asociitaj al riĉeco tiel, ke tensioj aperadas. La radikaligo, kiu ĵetas komunumon kontraŭ la alia, kreskiĝas kaj senkreditigas kelkajn el ili pro la malbonuzado de la amaskomunikiloj.

Kristanaj komunumoj en tia medio fariĝas, novmaniere, konsciaj pri sia unueco kiam ili dividas komunan zorgon kaj serĉas komunan respondon al nejusta realaĵo. Samtempe, antaŭ tiaj nejustecoj, ni estas devigitaj, kiel kristanoj, ekzameni la situaciojn, en kiuj ni fariĝis komplicoj. Nur donante plenan atenton al la preĝo de Jesuo „por ke ili estu unu“ ni povas atesti la vivadon de unueco en la diverseco. Per nia unueco en Kristo, ni kapablos kontraŭi la nejustecon kaj respondi al la bezonoj de viktimoj.

Movitaj de ĉi tiuj konsideroj, la indoneziaj kristanoj sentis, ke la vortoj de Readmono – „Justecon, justecon sekvu“ (v. Rea 16,18-20) – parolis forte pri iliaj situacio kaj bezonoj. Antaŭ ol eniri la teron, kiun Dio promesis doni al ili, la popolo de Dio renovigis sian sindevigon kun la Alianco, kiun Dio estis farinta kun ili. La biblia citaĵo venas el ĉapitro, kies

[1] *La kvin principoj de Pankazila estas: (1) Kredo en ununura Dio; (2) Homaro justa kaj civilizita; (3) La unueco de Indonezio; (4) Demokratio gvidita per saĝeco interna kaj unueco alveninta el komuna decido inter la reprezentantoj; (5) Socia Justeco por la tuta popolo de Indonezio.*

centra temo rilatas al la festadoj celebrotaj de la Alianca popolo. Post ĉia festo, la popolo estas orientita: „Kaj estu gaja en via festo, vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj via servantino, kaj la Levido kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas en viaj pordegoj“ (Rea 16,14; v. ankaŭ 16,11). Indoneziaj kristanoj esperas revivigi tiun saman spiriton de festadoj, kiu inkluzivigas ĉiujn en iliaj komunumoj, en kiuj ili antaŭe jam estis vivintaj. Je la fino de ĉi tiu longa ĉapitro povas esti strange, ke du versikloj rekomendas la establon de juĝistoj, sed en ĉi tiu indonezia kunteksto la ligilo inter festoj kaj justeco al ĉiuj fariĝas tre vivanta. Kiel popolo de la Alianco establita en Jesuo, ni scias, ke la ĝojoj de la ĉiela bankedo estos donitaj al tiuj, kiuj havas malsaton kaj soifon kaj estas persekutitaj pro justeco „ĉar ilia estas la Regno de la ĉielo“ (Mat 5, 6-10).

La Eklezio de Kristo estas vokita fariĝi specimeno de ĉi tiu Regno. Tamen, pro nia senunueco, ni malsukcesadas. Ni ĉesas esti signo de la amo de Dio al lia popolo. Sammaniere, ĉar la nejusteco pliigis la dividojn, kiuj atingis la indonezian societon, ĝi ankaŭ nutris dividojn en la Eklezio. Ni pentas pri la nejusteco, kiu kaŭzas dividon, sed tamen, kiel kristanoj, ni ankaŭ kredas je la potenco de Kristo por pardoni kaj sanigi. Kaj tiel, ni rekontiĝas kunigitaj sub la kruco de Kristo, petante al Li kaj la gracon por finigi la nejustecon kaj lian kompatemon antaŭ la pekoj, kiuj kaŭzas nian dividon.

La pripensoj por la ok tagoj kaj la celebro estos fokusigantaj la elektitan temon. Por profundigi nian pripenson pri la unueco kaj justeco, la ĉiutaga temo estis zorge elektita por prezenti la necesajn luktojn kontraŭ la nejusteco. La temoj estas:

Tago 1-a: Sed justeco fluu kiel akvo (Amo 5,24)
Tago 2-a: Sed via parolo estu: Jes, jes, ne, ne. (Mat 5,37)
Tago 3-a: Kompatema kaj favorkora estas la Eternulo (Psa 145,8)
Tago 4-a: Estu kontentaj je tio, kion vi havas (Heb 13,5)
Tago 5-a: Bonanonci al malriĉuloj (Luk 4,18)
Tago 6-a: Eternulo Cebaot (*de la armeoj*) estas Lia nomo (Jer 10,16)
Tago 7-a: Ho virino, granda estas via fido (Mat 15,28)
Tago 8-a: La Eternulo estas mia lumo kaj mia savo (Psa 27,1)

# LA PREPARO DE LA MATERIALO POR LA PREĜSEMAJNO

La ĉijaran preĝsemajnon antaŭpreparis diversaj kristanaj konfesioj en Indonezio.

Tiun ekumenan grupon invitis indoneziaj kristanaj komunumoj (*Persekutitan Gereja-gereja di Indonesia, PGI*) – gvidata de Henriette T. Hutabarat Lebang kaj la Indonezia katolika episkopara konferenco (*Konferensi Waligereja Indonesia, KWI*) kiun reprezentas mons. Ignatius Suharyo.

Apartan dankon al la gvidado de PGI kaj KWI, kiel al ĉiuj, kiuj laboris por la materialaj aferoj:

- Sinjorino Rahel Daulay,M.L.M. (eklezia muzikistino kaj docento de la Teologia Seminario en Jakarta, Indonezia Metodista Eklezio)

- Sac. Dr. Junifrius Gultom (direktoro de la teologia doktora programo en la Seminario Bethel, Indonezia Bethel-Eklezio)

- Pastorino Dr. Justitia Vox Dei Hattu (Docentino en la Seminario de Jakarta kaj pastorino de la Protestanta eklezio en Mekka)

- Pastorino Dr. Henriette T. Hutabarat Lebang (prezidantino de la Komunumo de la Eklezioj en Indonezio, Eklezio Toraja)

- Pastorino Irene Umbu Lolo, M.Th. (Kristanaj eklezioj en Sumba)

- Sinjoro Williams Bill Mailoa, S.Si. (Theol.) (membro de la departamento de liturgiko kaj eklezia muziko, Indonezia kristana eklezio)

- Pastorino Yolanda Pantou (membro de la komisiono de kredo- kaj eklezia juro kaj pastorino de la Indonezia kristana eklezio)

- Sac. Yohanes Rusae, Lic.Lit. (sekretario de la Liturgia komisiono de Indonezia katolika episkopara konferenco)

- Sinjorino Susan Fr. Sahusilawane, S.Si. (Theol.) (kunlaborantino de „World Vision Indonesia“ kaj membro de la liturgia kaj eklezia muzika centro de Teologia Seminario, en Jakarta; Protestanta kristana eklezio de okcidenta Indonezio)

- Sac. Agus Ulahay (sekretario de la Ekumena komisiono kaj interreligiaj rilatoj de Indonezia katolika episkopara konferenco)

- Pastorino Sri Yuliana, M.Th. (aganta sekretarino por la unueco kaj la eklezia renovigo, Komunumo de la eklezioj en Indonezio, Kristana eklezio de la suda Sumatro)

La indonezia antaŭprepara grupo prezentis la preparitajn materialojn al la internacia laborgrupo kiun konsistigas la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC).

La tekstaro estis finredaktita dum la kunsido kiu okazis en Guest Houseu PGI en Jakarta inter la 3-a kaj la 8-a de septembro 2017.
La internacia laborgrupo havis eblecon kune kun la Gereja Toraja Jemaat Kota kaj Gereja Katolik Santo Yakobus in Kelapa Gading (Jakarta) (religiaj organizaĵoj) havi komunan diservon.

Unu vizito en la bela parko „Malgranda Indonezio“ kiu montras la multkoloran kaj riĉan Indonezion, helpis al la internacia laborgrupo kompreni buntecon kaj riĉecon de la kulturoj kaj religioj en Indonezio, kaj same la bazajn principojn kiuj unuigas ĉi tiun nacion.
La interparolo kuni uj membroj de la Indonezia kristana forumo same pliriĉigis la komprenon de la ekumena unueco de la eklezioj en Indonezio kaj pri iliaj roloj en la konstruado de pli paca kaj pli justa socio en Indonezio.
La lastan tagon la membroj de la Internacia laborgrupo havis la eblecon ĉe la Teologia Seminario en Jakarta al la studentoj kaj la profesoroj kaj al la gvidantoj de la eklezioj kaj al laikoj prezenti la Preĝsemajnon.

La internacia laborgrupo estas dankata al la gvidantoj de la Indonezia ekleziaj komunumoj, ke oni akceptis ilin kun granda gastamo kaj dankas al la kunlaborantoj, kiuj preparis al ili agrablan loĝejon, aparte al pastorino Sri Yuliana kaj sinjoro Abdiel Tanias.

Plua danko por la kunlaborantoj de la Katolika episkopa konferenco de Indonezio, aparte al sac. Agus Ulahay.

# EKUMENA DISERVO
## Justecon, justecon sekvu
## *(Rea 16, 18-20)*

**G:** Gvidanto
**K:** Komunumo
**L:** Leganto

**Enkonduko**

La diservo elstarigas la gravecon ekiri, el niaj paroladoj pri unueco, justeco kaj mizerikordo, al agado kaj konkreta sindevigo kiu kondukos al la praktiko de unueco, justeco kaj mizerikordo en niaj personaj vivoj kaj en la vivado de niaj kristanaj komunumoj.

Du apartaj elementoj de la diservo bezonas esti rigardataj dum la pretigo de la celebrado. La unua rilatiĝas al la elekto de la legantoj por la **Preĝo de Pento.** Estas grave ke la unua Leganto (L 1) estu ordinita sacerdoto aŭ gvidanto de la komunumo, dum la aliaj du legantoj povas esti simplaj kredantoj.

La dua elemento rilatiĝas al la simbola liturgia agado, kiu venas post la **Sindevigo pri la Unueco tra la Justeco kaj la Mizerikordo.** Estos necese pretigi du kartojn aŭ etikedojn por ĉiu homo. Dum la diservo, partoprenontoj estos vokitaj pripensi kiel ili povos akcepti sindevigon per aparta ago de justeco, mizerikordo aŭ unueco. Ili tiam estos invitataj skribi sur ĉiu el la kartoj kiu estas ilia konkreta sindevigo. Ĉiu homo alligas unu el tiuj kartoj sur sia vesto, je la punkto de sia brusto. La duaj kartoj ariĝos por esti prezentotaj kiel ofero kaj lokiĝos je la piedo de la kruco. Fine de la celebro, la kartoj estos disdonitaj al ĉiu, kiu eliras la preĝejon, intence ke ĉiu preĝos pri la sindevigo de aliulo.

### ENIRA PROCESIO KAJ ENKONDUKA SALUTO

**G:** En la nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito-

**K**: Amen.

**G:** La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu kun vi ĉiuj.

**K:** Kaj kun vi ankaŭ.

**G:** Kiel kristanoj el apartaj komunumoj, ni unuiĝas por preĝi por la unueco. Ĉijare, la temo por la Semajno de Preĝo por la kristana Unueco, elektita de la Eklezioj ĉe Indonezio, estas „Justecon, justecon sekvu". Tiu temo estas imperativa pro la oftaj situacioj kiuj alportas dividojn kaj konfliktojn. Dum ni preĝas kune, ni memoras ke, kiel membroj de la korpo de Kristo, ni estas vokataj serĉi kaj videbligi la justecon. Nia unueco en Kristo kapabligas nin partopreni la batalon por la justeco kaj instigi la dignon de la vivo.

**G**: Karaj geamikoj en Kristo, kuniĝintaj por tiu preĝodiservo por la unueco, ni dankas Dion pro nia kristana heredo, pro Lia sava kaj liberiga agado ĉe la historio de la homaro. Ni adoru la Triunuan Dion. Dio, nia Patro, vi kronas la kreitaron per justeco kaj mizerikordo.

**K: Ni venis adori vin.**

**G:** Jesuo Kristo, via kruco alportas novan vivon kaj justecon.
**K: Ni venis adori vin.**

**G:** Sankta Spirito, vi inspiras niajn korojn agi justmaniere.
**K: Ni venis adori vin.**

**G:** Ke la graco de la Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la akompanado de la Sankta Spirito estu kun ĉiuj ĉeestantoj.

**K: Amen.**

## PENTOPREĜO

**G:** Amataj gefratoj, ni konfesu antaŭ la Sinjoro ke ni estas pekintaj, kaj ni petu Lian pardonon por ke nia preĝo estu agrabla al Dio.

**L1:** Kompatema Dio, vi elektis nin esti paŝtistoj en via grego. Jesuo, via Filo, instruis nin agi per justa maniero. Ni konscias ke ĉe nia servado ni kelkfoje kondutas maljuste rilate al la homoj kiujn vi fidis al ni, priorizante tiujn kiuj estas pli proksimaj al ni aŭ havas pli altan socian pozicion, ignorante la malsamulojn, la malriĉulojn kaj la malpli valorigitajn ĉe la socio, pro timo defendi la subpremitojn, misuzante la rimedojn de la Eklezio. Tiuj agoj instigis kelkajn homojn malproksimiĝi el via Eklezio. Sinjoro, kompatu nin.

**K: Sinjoro, kompatu nin.**

**L2:** Amoplena Dio, vi unuigis nin kiel membrojn de via grego. Jesuo, via Filo, instruis nin ami unuj la aliajn kiel signo esti liaj disĉiploj. Ni konfesas ke ni estas fiaskintaj pri la vivado de tiu amo ordono, rigardinte tiujn de la aliaj Eklezioj kvazaŭ rivalojn, malamike aginte unuj al la aliaj, kaj malrapidaj por pardoni, enfokusiginte nur niajn personajn interesojn, ignorinte la necesaĵon de niaj gefratoj, ekskludinte tiujn kiuj ne partoprenas nian vidpunkton. Tiel aginte, niaj sintenoj plifortigas la murojn kiuj dividas nin. Sinjoro, kompatu nin.

**K: Sinjoro, kompatu nin.**

**L3:** Plengraca Dio, vi komisiis nin fari nian komunan domon loko de justeco por ĉiuj. Laŭ via grandanima amo, vi sendas pluvon por justuloj kaj maljustuloj kaj, en Jesuo, vi instruas nin ami sen diferencigo. Ni konfesas ke ni estas fiaskintaj en la sekvo de tiuj instruoj, malrespektinte nian proksimulon, disvastiginte malverojn ĉe variaj sociaj retoj, partopreninte la rompon de la socia harmonio. Nia konduto portas la riskon fari la mondon kampo kun baroj kiuj ne plu kondukas la justecon al tuta kreaĵaro. Sinjoro, kompatu nin.

**K: Sinjoro, kompatu nin.**

**G:** Ke la Ĉiopova Sinjoro kompatu nin, pardonu niajn pekojn kaj konduku nin al la eterna vivo.

**K: Amen.**

**Kanto/Muziko**

## PROKLAMO DE LA DIA VORTO

**Unua legaĵo: Rea 16, 11-20**

Kaj estu gajaj antaŭ la Eternulo, via Dio, vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj via servantino, kaj la Levido, kiu estas en viaj pordegoj, kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas inter vi, sur la loko, kiun elektos la Eternulo, via Dio, por loĝigi tie Sian nomon. Kaj memoru, ke vi estis sklavo en Egiptujo; kaj observu kaj plenumu ĉi tiujn leĝojn.
Feston de laŭboj faru al vi dum sep tagoj, kiam vi kolektos el via draŝejo kaj el via vinpremejo. Kaj estu gajaj en via festo, vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj via servantino, kaj la Levido kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas inter viaj pordegoj. Dum sep tagoj festu al la Eternulo, via Dio, sur la loko, kiun elektos la Eternulo; ĉar benos vin la Eternulo, via Dio, en ĉiuj viaj produktaĵoj kaj en ĉiuj faroj de viaj manoj, kaj vi estos tute gaja.
Tri fojojn en la jaro ĉiu via virseksulo devas aperi antaŭ la Eternulo, via Dio, sur la loko, kiun Li elektos: en la festo de macoj kaj en la festo de semajnoj kaj en la festo de laŭboj; kaj li ne aperu antaŭ la Eternulo kun malplenaj manoj; ĉiu kun donaco en sia mano, konforme al la beno de la Eternulo, via Dio, kiun Li donis al vi.
Juĝistojn kaj kontrolistojn starigu al vi en ĉiuj viaj urboj, kiujn la Eternulo, via Dio, donos al vi laŭ viaj triboj; kaj ili juĝu la popolon per juĝo justa. Ne klinu la leĝon, ne atentu personojn; kaj ne prenu subaĉeton, ĉar subaĉeto blindigas la okulojn de saĝuloj kaj konfuzas la aferojn de justuloj. Justecon, justecon sekvu, por ke vi vivu kaj posedu la landon, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.

**Responda Psalmo: Psa 82, 1-8**

**R: Stariĝu, ho Dio, kaj juĝu la teron.**

Dio stariĝis en Dia anaro;
Inter la dioj Li juĝas.
Ĝis kiam vi juĝos maljuste,
Kaj privilegios la personojn de malvirtuloj?
**R: Stariĝu, ho Dio, kaj juĝu la teron.**

Estu justaj al malriĉulo kaj orfo;
Rilate afliktiton kaj senhavulon estu virtaj.
Liberigu malriĉulon kaj mizerulon;
El la mano de malvirtulo ilin savu.
**R: Stariĝu, ho Dio, kaj juĝu la teron.**

Ili ne scias kaj ne komprenas,
En mallumo ili marŝas;
Ekŝanceliĝis ĉiuj fundamentoj de la tero.
**R: Stariĝu, ho Dio, kaj juĝu la teron.**

Mi diris: Vi estas dioj,
Kaj ĉiuj vi estas filoj de la Plejaltulo;
Sed vi mortos, kiel homoj,
Kaj vi falos, kiel ĉiu el la potenculoj.
Leviĝu, ho Dio, juĝu la teron;
Ĉar Vi heredas ĉiujn popolojn.
**R: Stariĝu, ho Dio, kaj juĝu la teron.**

**Dua legaĵo:** Rom 12, 1-13

Mi do vin petas, fratoj, pro la kompatoj de Dio, ke vi prezentu viajn korpojn kiel vivantan oferon, sanktan, plaĉantan al Dio, kio estas via racia servo. Kaj ne konformiĝu al ĉi tiu mondo; sed aliformiĝu per renovigado de via menso, por ke vi provu, kio estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio.
Ĉar mi diras al ĉiu el vi, per la graco al mi donita, ke li ne tro estimu sin, sed estimu sin kun modereco, laŭ mezuro de la fido, kiun Dio disdonis al ĉiu. Ĉar kiel ni havas multajn membrojn en unu korpo, kaj ne ĉiuj membroj havas la saman funkcion, tiel same ni multaj estas unu korpo en Kristo, kaj ĉiuj aparte membroj unu de alia. Sed havante donacojn diversajn laŭ la graco donita al ni, ĉu profetadon, ni profetu laŭ la mezuro de nia fido; aŭ servadon, ni laboru en nia servado; aŭ instruanto, en sia instruado; aŭ admonanto, en sia admonado; la disdonanto agu malavare, la administranto kun diligenteco, la kompatanto kun ĝojo. Via amo estu sen hipokriteco. Abomenu tion, kio estas malbona; algluiĝu al la bona. En fratamo estu kore unuigitaj unu al alia, honore preferantaj unu la alian; en diligenteco ne malviglaj, en spirito fervoraj, servantaj la Sinjoron; en espero ĝojaj, en aflikto paciencaj, en preĝado persistaj; kotizantaj por la bezonoj de la sanktuloj, sekvantaj gastamecon.

**Haleluja**

**Evangelio:** Luk 4, 14-21

Kaj revenis Jesuo en la potenco de la Spirito en Galileon; kaj eliris famo pri li tra la tuta ĉirkaŭaĵo. Kaj li instruadis en iliaj sinagogoj, glorate de ĉiuj. Kaj li venis al Nazaret, kie li estis edukita; kaj laŭ sia kutimo li eniris en la sinagogon en la sabata tago, kaj stariĝis, por legi. Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja. Kaj, malferminte la libron, li trovis la lokon, kie estis skribite: La spirito de la Eternulo estas sur mi, Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj Kaj vidpovon al blinduloj, Por meti la vunditojn en liberecon, Por proklami favorjaron de la Eternulo. Kaj kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, li sidiĝis; kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis. Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj.

**Homilio**

**SINDEVIGO RILATE AL LA JUSTECO, AL LA MIZERIKORDO KAJ AL LA UNUECO**

**G:** Jesuo Kristo preĝas por la unueco de siaj disĉiploj. La donaco de sia vivo estas justeco por la mondo.

**L1:** Kiel membroj de la korpo de Kristo, ni estas vokataj kune sekvi laŭ Lia vojo.
**L2:** Ni aŭdu Lian alvokon.

**K: Sankta Spirito, unuigu nin en agado.**

**L1:** Kiel membroj de la korpo de Kristo, ni estas vokataj konservi niajn vivojn liberaj el la amo al mono, kaj esti kontentaj kun tio kion ni havas.
**L2:** Ni rompu la ciklon de la gajnavideco kaj vivu laŭ la simpleco.

**K: Sankta Spirito, unuigu nin en agado.**

**L1:** Kiel membroj de la korpo de Kristo, ni estas vokataj proklami liberecon al la malliberuloj kaj viktimoj de ĉiuj formoj de perforto.
**L2:** Ni helpu ilin digne vivi.

**K: Sankta Spirito, unuigu nin en agado.**

**L1:** Kiel membroj de la korpo de Kristo, ni estas vokataj etendi gastamecon al la migrantoj.
**L2:** Ni konkure superu unuj la aliajn, sciante honori tiun alvokon.

**K: Sankta Spirito, unuigu nin en agado.**

**L1:** Kiel membroj de la korpo de Kristo, ni estas vokataj proklami la bonan novaĵon al la kunaĵo de la kreitaro.
**L2:** Ni protektu la vivon kaj la belecon de la kreitaro de Dio.

**K: Sankta Spirito, unuigu nin en agado.**

**G:** Por konkretigi nian individuan sindevigon kunlabori por la justeco, ĉiu homo ĉi tie estas invitata skribi sian sindevigon sur du apartaj kartoj. Ni invitas ĉiujn konservi unun el tiuj kartoj apud sia koro. La dua kolektiĝos kaj alportiĝos kiel oferaĵo.

*(Kanto kiu pritraktas unuecon kaj/aŭ justecon povas esti kantata dum la homoj skribas siajn kompromisojn)*

## OFERO

**G:** Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio (Miĥ 6,8). Pro tio ni nin devontigas havi agojn de justeco.

*(Tiumomente oni kolektas la duajn kartojn kaj elportas ilin por esti metataj pieden de la kruco)*

**G:** Plengraca Dio, vi montradas vian kompaton kaj zorgon pri via tuta kreitaro. Via amo inspiras nin oferi tiujn devontigojn agi laŭ justeco, amante la aliajn per tuta la koro, kia ajn estas ilia kultura, religia kaj etna medio. Akceptu nun niajn oferojn kaj transformu ilin en agon por la unueco de via Eklezio. Tiel ni vin petas per via Filo Jesuo Kristo, en la povo de la Sankta Spirito, kiu vivas kun vi kiel Dio ununura tra tutaj tempoj kaj por ĉiam.

**K: Amen.**

## APOSTOLA KREDO-KONFESO

**G**: Gefratoj, kiel gefiloj de Dio ni interŝanĝu la pacsignon, por ke ni povu kune eldiri la kredo konfeson.

**G+K**: Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova,
la kreinto de la ĉielo kaj de la tero;
kaj je Jesuo Kristo,
Lia unu-nura Filo, nia Sinjoro,
koncipita per la Sankta Spirito,
naskita el Maria la Virgulino,

suferinta sub Poncio Pilato,
krucumita, mortinta kaj entombigita,
sobirinta en la regnon de la morto.
La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj,
supren-iris al la ĉielo,
sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,
de kie Li venos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.
Mi kredas je la Sankta Spirito,
la sankta katolika* eklezio,
la komuno de la sanktuloj,
la pardono de la pekoj,
la releviĝo de la mortintoj,
kaj la vivo eterna.
Amen.

## PREĜO POR LA POPOLO

**G:** Ni levu al la Sinjoro niajn komunajn preĝojn por la Eklezio kaj por la necesaĵoj de tuta la homaro.

**L:** El la insuloj kaj oceanoj
Ni adoras vin, ho Dio, Kreanto de la vivo.
Laŭlonge de la montoj kaj valoj,
Ni laŭdas vin, ho Dio, savanto de la mondo.
Per la lingvoj de ĉiuj nacioj,
Ni vin dankas, ho Dio, konsolanto de la korpoj kaj animoj.
Ni venas antaŭ vin portante niajn ŝarĝojn kaj esperojn.
Hodiaŭ ni petas al vi:

**K: Ho Dio, aŭdu nian preĝon kaj donu al ni vian amon.**

**L:** Ni pregas por tiuj kiuj vivas meze de la maljusteco.
Kuraĝigu nin por ke ni povu levi iliajn voĉojn
kaj fortigi iliajn esperojn.
Ni preĝas por tiuj kiuj daŭre eternigas la maljustecon.
Ke via boneco plenigu niajn korojn
Kaj faru nin agantoj de libereco kaj espero.
Ni volas agi per justeco, laŭ viaj vortoj.
Hodiaŭ ni petas al vi:

**K: Ho Dio, aŭdu nian preĝon kaj donu al ni vian justecon.**

**L:** Ni preĝas por la videbla unueco de la Eklezio.
Konduku nin tiel ke ni povas bone akcepti la preĝon de Jesuo, ke ni estu unu kaj laboru kune por manifesti vian Regnon.
Hodiaŭ ni petas al vi:

**K: Ho Dio, aŭdu nian preĝon kaj donu al ni pasion por la unueco.**

**L:** Ni dankas vin pro la multaj koloroj,
kulturoj kaj kutimoj kiujn ni partigas ĉe tiu ĉi mondo.

En niaj diferencoj, ke via amo unuigu nin.
Kapabligu nin agi kune,
subtenante la vivon kaj igante tiun ĉi mondon domo justa
kaj paca por tuta la homaro.
Hodiaŭ ni petas al vi:

**K: Ho Dio, aŭdu nian preĝon kaj donu al ni vian pacon.**

**Preĝo de la Sinjoro**

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo.
Venu Via regno.
Fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar Via estas la regno
kaj la potenco
kaj la gloro eterne.
Amen.

**Kanto**

**FINO KAJ BENO**

**G:** Elirontaj el tiu ĉi renkonto, ĉiuj ricevos unun el la kartoj kun sindevigoj.
Ni invitas ĉiujn preĝi por la devontigo indikita en la ricevota karto.

**Beno**

**G:** Ke la Sinjoro ĉirkaŭvolvu ĉiun per sia amo
Kaj fluigu el ni la bonecon.
Ke Dio ardigu en ĉiu la kuraĝon
Kaj transformu nin en agantojn de sia justeco kaj paco.
Ke la Sinĵoro donu al ni humilecon
Kaj persiston por nutri la unuecon.

**Amen.**

*(Elirante, la ĉeestantoj prenas po unu papereton kun la siundevigo)*

**TAGO 1-a:**
**SED JUSTECO FLUU KIEL AKVO (Amo 5,24)**

***Legaĵoj:***

**Amo 5, 22-25**
Kiam vi alportas al Mi bruloferojn kaj viajn farunoferojn, Mi ne akceptas ilin, kaj viajn grasajn dankoferojn Mi ne rigardas. Forigu de Mi la bruon de viaj kantoj, la sonadon de viaj psalteroj Mi ne volas aŭskulti. Sed justeco fluu kiel akvo, kaj vero kiel potenca torento. Ĉu buĉoferojn kaj farunoferojn vi alportadis al Mi en la dezerto dum kvardek jaroj, ho domo de Izrael?

**Luk 11, 37-44**
Kaj dum li parolis, unu Fariseo invitis lin matenmanĝi kun li; kaj li eniris kaj sidiĝis. Kaj la Fariseo, ekvidinte, miris, ke li ne lavis sin antaŭ la matenmanĝo. Kaj la Sinjoro diris al li: Vi Fariseoj purigas la eksteron de kaliko kaj plado, sed via interno estas plena de rabado kaj malvirto. Malsaĝuloj! ĉu Tiu, kiu faris la eksteron, ne faris ankaŭ la internon? Tamen, uzu por almozo la internaĵojn, kaj jen ĉio estas al vi pura. Sed ve al vi, Fariseoj! ĉar vi pagas dekonaĵojn de mento kaj ruto kaj ĉiu vegetaĵo, kaj preterlasas juĝon kaj amon al Dio; ĉi tion vi devus fari, kaj tion ne preterlasi. Ve al vi, Fariseoj! ĉar vi amas la ĉefseĝojn en la sinagogoj, kaj la salutojn sur la placoj. Ve al vi! ĉar vi similas tombojn ne vidatajn; kaj la homoj, kiuj iras super ili, ne scias.

***Medito:***

Kristanoj foje povas esti tre engaĝitaj en preĝo kaj adoro, sed malpli zorgas pri la malriĉuloj kaj marĝenitaj. Kelkfoje ni preĝas en preĝejo, sed samtempe premas niajn najbarojn aŭ ekspluatas la medion. Kristanoj en Indonezio rekonas, ke en ilia lando estas homoj, kiuj penas provi praktiki sian fidon, sed, kiuj premas tiujn de aliaj kredoj, eĉ per perforto. Sed en la Evangelio de Luko, Jesuo rememorigas nin, ke la ekstera signo de vera kulto de Dio agas juste. Li estas malmola pro sia kondamno de tiuj, kiuj neglektas ĉi tiun devon. En la profetaĵo de Amos, Dio malakceptas la kulturon de tiuj, kiuj neglektas la justecon, ĝis ili faligu malsupren kiel akvon kaj justecon kiel eterna fluo (5:24). La profeto insistas pri la absoluta ligo inter kulto kaj farado de justeco. Kiam kristanoj kune kunlaboras por aŭskulti la krion de la malriĉuloj kaj la prematoj, ili ekkreskas unu kun la alia kaj kun la Triunua Dio.

***Preĝo:***

Dio de la vidvino, orfo kaj fremdulo, Vi montris al ni la vojon de justeco.
Helpu nin sekvi vian vojon per justeco kiel nia adoro de vi.
Kiel kristanoj kune, ni povas adori vin ne nur per niaj koroj kaj mensoj,
sed ankaŭ per niaj faroj.
La Sankta Spirito helpu kaj gvidu nin labori por justeco, kie ajn ni estas,
por ke multaj homoj estu plifortigitaj per niaj laboroj.
En la nomo de Jesuo.
Amen

**TAGO 2-a:**
**SED VIA PAROLO ESTU: JES, JES, NE, NE. (Mat 5,37)**

***Legaĵoj:***

**Efe 4, 22-25**

Por ke vi formetu, rilate al antaŭa konduto, la malnovan homon, pereeman laŭ trompaj deziroj, kaj renoviĝu rilate al la spirito de via menso, kaj surmetu la novan homon, kreitan laŭ Dio en justeco kaj vera sankteco. ro tio, formetante malveron, ĉiu parolu veron kun sia proksimulo, ĉar ni estas membroj unu de alia.

**Mat 5, 33-37**

Plue, vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj: Ne rompu ĵurojn, sed plenumu viajn ĵurojn antaŭ la Eternulo; sed mi diras al vi: Tute ne ĵuru; nek per la ĉielo, ĉar ĝi estas la trono de Dio; nek per la tero, ĉar ĝi estas la benketo de Liaj piedoj; nek per Jerusalem, ĉar ĝi estas urbo de la granda Reĝo. Nek ĵuru per via kapo, ĉar vi ne povas fari eĉ unu haron blanka aŭ nigra. Sed via parolo estu: Jes, jes, ne, ne; ĉio ekster tio estas el malbono.

***Medito:***

La perforto kontraŭ aliaj homoj konsistas ne nur en fizika atako aŭ ŝtelo, sed ankaŭ en klaĉoj kaj malicaj misfamoj. La sociaj amaskomunikiloj igas facile tuj disvastigi mensogojn al granda aŭskultantaro. La kristanoj de Indonezio konscias, ke iuj religiaj grupoj - inkluzive de kristanoj – povas tiamaniere disvastigi mensogojn kaj antaŭjuĝojn kontraŭ aliaj religiaj grupoj. La timo kaj la minaco de reprezalioj povas senkuraĝigi homojn stari por la vero kaj silentigi ilin antaŭ falsaj kaj maljustaj asertoj celantaj kaŭzi timon.
Jesuo firme diris: "Via jes estu jes, via ne ne; ĉio plia venas de la diablo". Falsaĵo detruas interrilatojn inter homoj kaj grupoj, inkluzive de eklezioj. Malhonesteco rompas la unuecon de la Eklezio. La Letero al la Efesanoj memorigas al ni, ke ni estas membroj de unu la alia. Ĉi tio vokas la kristanojn esti honestaj kaj responsaj unu pri la alia, por ke ili kresku en komuneco. Kiam ni tiel agas, tiam estas kun ni, ne la spirito de la maliculo, sed la Sankta Spirito de Dio.

***Preĝo:***

Dio de justeco,
Donu al ni la saĝecon distingi la bonon de la malbono.
Faru, ke niaj koroj estu gvidataj de la honesteco
Por ke niaj lipoj diru la veron.
Donu al ni la kuraĝon servi la veron eĉ se aliaj nin kontraŭstaras.
Ne lasu nin disvastigi mensogojn.
Anstataŭe, faru el ni instrumentojn de unueco kaj paco,
Disvastigantajn la evangelion al ĉiuj popoloj.
Ni preĝas al vi en la nomo de via filo, Jesuo Kristo.
Amen

**TAGO 3-a:**
**KOMPATEMA KAJ FAVORKORA ESTAS LA ETERNULO (Psa 145,8)**

***Legaĵoj:***

**Psa 145, 8-13**

Kompatema kaj favorkora estas la Eternulo,
Longetolera kaj kun granda boneco.
La Eternulo estas bona por ĉiuj;
Lia favorkoreco estas super ĉiuj Liaj kreitaĵoj.
Gloros Vin, ho Eternulo, ĉiuj Viaj kreitaĵoj,
Kaj Viaj fideluloj Vin benos.
Ili raportos pri la gloro de Via regno
Kaj parolos pri Via potenco,
Por sciigi al la homidoj Lian potencon
Kaj la majestan gloron de Lia regno.
Via reĝeco estas reĝeco eterna,
Kaj Via regado estas por ĉiuj generacioj.

**Mat 1, 1-17**

La genealogia registro de Jesuo Kristo, filo de David, filo de Abraham.
Al Abraham naskiĝis Isaak, kaj al Isaak naskiĝis Jakob, kaj al Jakob naskiĝis Jehuda kaj liaj fratoj, kaj al Jehuda naskiĝis Perec kaj Zeraĥ el Tamar, kaj al Perec naskiĝis Ĥecron, kaj al Ĥecron naskiĝis Ram, kaj al Ram naskiĝis Aminadab, kaj al Aminadab naskiĝis Naĥŝon, kaj al Naĥŝon naskiĝis Salma, kaj al Salma naskiĝis Boaz el Raĥab, kaj al Boaz naskiĝis Obed el Rut, kaj al Obed naskiĝis Jiŝaj, kaj al Jiŝaj naskiĝis David, la reĝo.
Kaj al David naskiĝis Salomono el la edzino de Urija, kaj al Salomono naskiĝis Reĥabeam, kaj al Reĥabeam naskiĝis Abija, kaj al Abija naskiĝis Asa, kaj al Asa naskiĝis Jehoŝafat, kaj al Jehoŝafat naskiĝis Joram, kaj al Joram naskiĝis Uzija, kaj al Uzija naskiĝis Jotam, kaj al Jotam naskiĝis Aĥaz, kaj al Aĥaz naskiĝis Ĥizkija, kaj al Ĥizkija naskiĝis Manase, kaj al Manase naskiĝis Amon, kaj al Amon naskiĝis Joŝija, kaj al Joŝija naskiĝis Jeĥonja kaj liaj fratoj, je la tempo de la transloĝiĝo en Babelon.
Kaj post la transloĝiĝo en Babelon, al Jeĥonja naskiĝis Ŝealtiel, kaj al Ŝealtiel naskiĝis Zerubabel, kaj al Zerubabel naskiĝis Abiud, kaj al Abiud naskiĝis Eljakim, kaj al Eljakim naskiĝis Azor, kaj al Azor naskiĝis Cadok, kaj al Cadok naskiĝis Aĥim, kaj al Aĥim naskiĝis Eliud, kaj al Eliud naskiĝis Eleazar, kaj al Eleazar naskiĝis Mattan, kaj al Mattan naskiĝis Jakob, kaj al Jakob naskiĝis Jozef, edzo de Maria, el kiu estis naskita Jesuo, kiu estas nomata Kristo.
Tial ĉiuj generacioj de Abraham ĝis David estas dek kvar generacioj, kaj de David ĝis la transloĝiĝo en Babelon dek kvar generacioj, kaj de la transloĝiĝo en Babelon ĝis la Kristo dek kvar generacioj.

***Medito:***

La Sinjoro estas bona por ĉiuj, plena je tenereco por ĉiuj siaj faritaĵoj – diras la psalmisto, proklamante ke la amo de Dio preteriras la limojn de la etnoj, kulturoj, raso kaj eĉ religio. La raporto de la genealogio de Jesuo en la evangelio de Mateo reflektas tiun larĝan vidadon. Dum la antikvaj kulturoj ofte vidis la virinojn kiel malsuprajn aŭ kiel propraĵon de siaj patroj aŭ edzoj, Mateo citas kvar virinojn inter la antaŭuloj de Jesuo, du el kiuj - Rut kaj Raab – estis el alia popolo. Tri aliaj antaŭuloj

en la listo estis konataj kiel pekuloj, inkluzivante la adultulon reĝon David. Citinte tiajn homojn en la genealogio de Jesuo kaj partopreniginte ilin en la homa historio de Dio, tie oni proklamas ke Dio inkluzivas ĉiujn, virojn kaj virinojn, pekulojn kaj justulojn, en sia sava plano, kiun ajn estas siaj antaŭuloj.
Indonezio estas nacio enhavanta pli ol 17.000 insuloj kaj 1.340 malsamajn etnajn grupojn, kaj la eklezioj estas ofte dividitaj pro la malsamaj etnaj linioj. Tiu diverseco, kie ĉiu sentas sin apartenanta al unu grupo, povas konduki iujn vidiĝi ununuraj posedantoj de la vero, tiel vundante la unuecon de la Eklezio. Meze de la kreskanta etna kaj religia fanatikismo, kaj per kreskanta spirito de maltoleremeco en la hodiaŭa mondo, la kristanoj povas servadi al la homa familio kunveninte por kune atesti la amon de Dio por ĉiuj, proklamante kun la psalmisto ke Dio estas kompatema kaj favorkora al ĉiuj.

***Preĝo:***

Patro, Filo kaj Sankta Spirito, ununura Dio,
ni laŭdas vin pro via granda gloro, kiu manifestiĝis en la kreitaro.
Donu al ni la gracon kiu respektigas nin tion kio estas unika kaj speciala
en ĉiu homo, por ke en nia diverseco ni povu vivi la sperton de la unueco.
Tiun preĝon ni faras en via sankta Nomo.
Amen.

## TAGO 4-a:
## ESTU KONTENTAJ JE TIO, KION VI HAVAS (Heb 13,5)

***Legaĵoj:***

### Heb 13, 1-5

La fratamo daŭradu. Ne forgesu gastamon al nekonatoj; ĉar per tio iuj gastigis anĝelojn, ne sciante. Memoru la katenitojn, kvazaŭ vi ankaŭ estus katenitaj, kaj la suferantojn, ĉar vi ankaŭ estas en la korpo. Estu honorata la edzeco ĉe ĉiuj, kaj la lito estu senmakula; ĉar malĉastulojn kaj adultulojn Dio juĝos. Estu via karaktero sen monamo; estu kontentaj je tio, kion vi havas; ĉar Li mem diris: Mi ne foriros de vi kaj ne forlasos vin.

### Mat 6, 25-34

Tial mi diras al vi: Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu, aŭ kion vi trinku; nek pri via korpo, kion vi surmetu. Ĉu la vivo ne estas pli ol nutraĵo, kaj la korpo pli ol vestaĵo? Rigardu la birdojn de la ĉielo, ke ili ne semas, nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn, kaj via Patro ĉiela ilin nutras. Ĉu vi ne multe pli valoras ol ili? Kaj kiu el vi per zorgado povas aldoni unu ulnon al sia staturo? Kaj kial vi zorgas pri vestaĵo? Pripensu la liliojn de la kampo, kiel ili kreskas: ili ne laboras, nek ŝpinas; tamen mi diras al vi, ke eĉ Salomono en sia tuta gloro ne estis ornamita, kiel unu el ĉi tiuj. Sed se Dio tiel vestas la kampan herbaĵon, kiu ekzistas hodiaŭ, kaj morgaŭ estos ĵetata en fornon, kiom pli certe Li vestos vin, ho malgrandfiduloj? Tial ne zorgu, dirante: Kion ni manĝu? aŭ: Kion ni trinku? aŭ: Kion ni surmetu? Ĉar pri ĉio tio serĉas la nacianoj; ĉar via Patro ĉiela scias, ke vi bezonas ĉion tion. Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi. Tial ne zorgu pri la morgaŭa tago, ĉar la morgaŭa tago zorgos pri si mem. Sufiĉa por la tago estas ĝia propra malbono.

*Medito:*

La aŭtoro de la Letero al la Hebreoj avertas pri troa amo al mono kaj materiaj aferoj. Fronte al nia inklino pensi, ke neniam havas ni sufiĉe, la teksto parolas al ni pri la zorgemo de Dio kaj certigas nin pri tio, ke Dio neniam forlasos la kreitaron. Pere de la fekundo de la tero, riveroj kaj maroj, la Dia bonvolo provizis sufiĉe da nutraĵoj kaj drinkebla akvo por la subteno de ĉiuj estaĵoj; tamen tiuj bazaj aferoj mankas al multaj homoj. La homaj fragilo kaj monavido kondukas ofte al koruptado, al maljusteco, al malriĉeco, al malsato. Povas esti tenta tio, ke anstataŭ zorgi pri la aliaj kaj kun ili dividi niajn havaĵojn, ni amasigu monon, manĝaĵojn kaj rimedojn ekskluzive por ni, niaj aparta regno aŭ etna grupo.
Tamen Jesuo instruas nin, ke nia ĉefa zorgo ne devas esti pri la materiaj aferoj sed pri serĉado de la Dia Regno kaj ĉio rilata, fide je tio, ke la Patro Ĉiela nin provizos pri tio necesa. Dum la lastaj jaroj kelkaj eklezaj komunumoj el Indonezio oferis diverstipan financan, edukan helpon al malgrandaj kamparanaj eklezaj komunumoj. Per ĉi simpla kaj praktika ekzemplo je reciproka amo ili montras unuecon al la kristanaj fratoj, kio konsistigas donacon de Dio al Sia eklezio.
Vivi pli simple, sen la zorgo pergajni pli da mono ol bezonate aŭ amasigi rimedojn por la estonto, povas helpi nin fari el la Tero nian komunan hejmon, lokon pli justan.

*Preĝo:*

Dio mizerikorda
Ni Vin dankas pro Viaj abundaj donacoj
Donu al ni la gracon ricevi ĉiujn benojn
per simpla kaj humila dankemo.
Faru nin kapablaj kontentiĝi kaj esti pretaj dividi kun la bezonuloj
por ke ĉiuj povu sperti la unuecon en la amo, kiu el Vi fontas. Dio Nia Unua kaj Triunua kiu vivas kaj regas en la jarcentoj da jarcentoj.
Amen

## TAGO 5-a:
## BONANONCI AL MALRIĈULOJ (Luk 4,18)

*Legaĵoj:*

**Amo 8, 4-8**

Aŭskultu ĉi tion, vi, kiuj penas engluti la malriĉulojn kaj pereigi la humilulojn de la tero,kaj kiuj diras: Kiam pasos la monatkomenco, ke ni povu vendadi grenon? kaj la sabato, ke ni povu malfermi la grenejon? Ni malgrandigos la mezuron, ni pligrandigos la prezon, kaj ni trompos per falsa pesilo; ni aĉetos senhavulojn per mono kaj malriĉulon per paro da ŝuoj, kaj grenventumaĵon ni vendos kun la greno. La Eternulo ĵuris per la gloro de Jakob: Neniam Mi forgesos ĉiujn iliajn farojn. Ĉu pro tio ne ektremos la tero, ne ekploros ĉiuj ĝiaj loĝantoj? Ĝi tuta ekskuiĝos kiel lago, ĝi leviĝos kaj malleviĝos kiel la Rivero de Egiptujo.

**Luk 4, 16-21**

Kaj li venis al Nazaret, kie li estis edukita; kaj laŭ sia kutimo li eniris en la sinagogon en la sabata tago, kaj stariĝis, por legi. Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja. Kaj, malferminte la libron, li trovis la lokon, kie estis skribite: La spirito de la Eternulo estas sur

mi, Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj Kaj vidpovon al blinduloj, Por meti la vunditojn en liberecon, Por proklami favorjaron de la Eternulo. Kaj kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, li sidiĝis; kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis. Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj.

***Medito:***

Profeto Amos kritikis komercistojn kiuj trompis kaj ekspluatadis la malriĉulon por gajni la maksimumon de profito. Amos ankaŭ elstarigas kiel Dio observas iliajn erarojn, kaj neniam ilin forgesos. Dio aŭdas la kriojn de la viktimoj de la maljusteco, kaj neniam forlasas la ekspluatitojn kaj maljuste traktitajn.
Ni vivas en tutmondigita mondo, kie la marĝeniĝo, la ekspluatado laj la maljusteco tre ĉeestas kaj disvastiĝas. La distanco inter riĉuloj kaj malriĉuloj plivastiĝadas. Ekonomiaj konkeroj fariĝas decidaj faktoroj en la rilatoj inter popoloj, nacioj kaj komunumoj. Ekonomiaj temoj ofte provokas tie streĉitecojn kaj konfliktojn. Estas malfacile vivi la ĝojon de la paco, kiam forestas la justeco.
Dank´al nia komuna Bapto, ĉiuj kristanoj partigas la profetan mision de Kristo, kiu proklamigas la bonan novaĵon al la malriĉuloj kaj malfortuloj, tiel vorte kiel agade. Kiam ni agnoskos tiun mision, la Spirito de la Sinjoro alvenos ankaŭ sur nin, kapabligante nin labori por la justeco. Nia digno de kristanoj puŝas nin tiel paroli kaj agi, ke ĉiutage plenumiĝu inter la aŭskultantaro la vortoj de la profeto Jesaja, kiujn Jesuo proklamis en Nazareto.

***Preĝo:***

Dio, nia Patro,
pardonu nian ambicion pri povo
kaj liberigu nin el la tento subpremi la aliajn.
Per via Sankta Spirito de komunio,
helpu nin vivi en solidareco kun nia proksimulo,
kaj tiel kune partigi, kun via Filo Jesuo,
la plenumadon de via promeso de liberigo
el malriĉeco kaj subpremado.
Ni pregas en lia Nomo.
Amen

## TAGO 6-a:
## ETERNULO CEBAOT (de la armeoj) ESTAS LIA NOMO (Jer 10,16)

***Legaĵoj:***

**Jer 10, 12-16**

Li kreis la teron per Sia forto, aranĝis la mondon per Sia saĝo, kaj per Sia prudento etendis la ĉielon. Kiam Li eksonigas Sian voĉon, kolektiĝas multego da akvo en la ĉielo; Li levas la nubojn de la randoj de la tero, Li aperigas fulmojn inter la pluvo, kaj eligas la venton el Siaj trezorejoj. Malsaĝiĝis ĉiu homo kun sia sciado, per honto kovriĝis ĉiu fandisto kun sia statuo; ĉar lia fanditaĵo estas malveraĵo, ĝi ne havas en si spiriton. Tio estas vantaĵo, faro de eraro;

kiam ili estos vizititaj, ili pereos. Ne simila al ili estas Tiu, kiun havas Jakob; ĉar Li estas la kreinto de ĉio, kaj Izrael estas la gento de Lia heredo; Eternulo Cebaot estas Lia nomo.

**Mar 16, 14-15**

Poste li aperis al la dek unu, dum ili sidis ĉe manĝo, kaj riproĉis ilian nekredemon kaj korobstinon, ĉar ili ne kredis tiujn, kiuj vidis lin leviĝintan.
Kaj li diris al ili: Iru en la tutan mondon, kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo.

***Medito:***

La kreita mondo estas manifestado de la mirakla forto de Dio. La grandeco de Dio vidiĝas en-kaj pere de-la tuta kreitaro: "La Sinjoro de la Armeoj estas Lia nomo"
Tamen, hodiaŭ ni konfrontiĝas kun grava kaj generala ekologia krizo, kiu minacas la postvivon de la natura mondo. La avideco faris, ke multoj ekspluatigu la kreitaron preter sia kapacito. En la nomo de la disvolvado, arbaroj estas forigitaj, kaj la poluo detruas la teron, aeron, riverojn kaj marojn, malebligante la agrikulturon, maltrovebligante puran akvon, mortigante la bestojn. En ĉi tiu konteksto, utilas memori, ke post la Resurekto, Jesuo komisiis siajn disĉiplojn alporti la Bonan Novaĵon al tuta kreitaro! Neniu ero de la kreitaro estas for de la Dia plano novigi ĉiujn aĵojn. Tial, oni bezonas konvertiĝi de ekspluatemo al sinteno kiu respektas la kreitaron kaj repacigas nin kun ĝi.
Movadoj inter diverskredaj personoj, kaj en Indonezio, kaj en multaj aliaj lokoj, inspiras la kristanojn antaŭenigi ekologiemajn Ekleziojn kaj kontraŭstari la agadojn damaĝantajn la ĉirkaŭan medion. Tio unuiĝas la kristanojn en ilia atesto de sia Kreanto, 'ĉar Li estas Tiu, kiu formis ĉiun aĵon". Kiam ni unuiĝas al aliaj kristanoj por la protekto de nia komuna hejmo, ni ne nur engaĝas nin en iu aktivismo, sed mi plenumas la ordonon de la Sinjoro proklami la Bonan Novaĵon de la saniganta kaj renoviganta Dia amo al la tuta kreitaro.

***Preĝo:***

Amanta Dio,
Pere de Via Vorto ĉiuj aĵoj estiĝis.
Ni dankas al Vi por la universo,
kiu manifestas Vian gloron, belecon kaj bonecon.
Donu al ni la saĝecon, milde iri surtere
kaj kune esti profetoj de Via bona novaĵo al tuta kreitaro.
Amen

## TAGO 7-a:
## HO VIRINO, GRANDA ESTAS VIA FIDO (Mat 15,28)

***Legaĵoj:***

**1 Sam 1, 13-17**

Ĥana parolis en sia koro; nur ŝiaj lipoj moviĝadis, sed ŝian voĉon oni ne aŭdis; tial Eli pensis, ke ŝi estas ebria. Kaj Eli diris al ŝi: Kiel longe vi restos ebria? forigu vian vinon el vi. Sed Ĥana respondis kaj diris: Ne, mia sinjoro, mi estas virino kun malĝoja koro; vinon aŭ ebriigaĵon mi ne trinkis, mi nur elverŝas mian animon antaŭ la Eternulo. Ne opiniu pri via sklavino, ke ŝi estas virino malmorala; pro mia granda malĝojo kaj sufero mi parolis ĝis nun.

Tiam Eli respondis kaj diris: Iru en paco, kaj la Dio de Izrael plenumos vian peton, kiun vi petis de Li.

**Mat 15, 21-28**

Kaj elirinte de tie, Jesuo foriris en la regionojn apud Tiro kaj Cidon. Kaj jen virino Kanaana, veninte el tiuj limlandoj, kriis, dirante: Ho Sinjoro, filo de David, kompatu min; mia filino estas terure turmentata de demono. Sed li ne respondis al ŝi eĉ unu vorton. Kaj alveninte, liaj disĉiploj petis lin, dirante: Forsendu ŝin, ĉar ŝi krias post ni. Kaj li responde diris: Mi ne estas sendita, krom al la perditaj ŝafoj el la domo de Izrael. Sed ŝi venis kaj adorkliniĝis al li, dirante: Sinjoro, helpu min. Sed li responde diris: Ne decas preni la panon de la infanoj kaj ĵeti ĝin al la hundetoj. Sed ŝi diris: Jes, Sinjoro; ĉar eĉ la hundetoj manĝas el la panpecetoj, kiuj falas de la tablo de iliaj sinjoroj. Tiam responde Jesuo diris al ŝi: Ho virino, granda estas via fido; estu al vi, kiel vi volas. Kaj ŝia filino estis sanigita de post tiu horo.

***Medito:***

Eli malkomprenas la preĝadon profundan kaj insistan. Li interpretis ŝian petegon balbutado ebriula kaj kondamnis ŝin pro tio. Sed ŝia respondo, ŝia alvoko ne reĵeti ŝin kiel senutilan virinon plimildigas lian koron kaj kun beno li sendas ŝin for. Similo okazas kiam venis la kanaana virino al Jesuo petegante lin sanigi filinon ŝian. Komence li forsendas ŝin deklarante ke li venus nur al la propra popolo. Sed ŝi ne ĉesas petegi kaj urĝigi kaj finfine Jesuo ja plenumas ŝian peton agnoskante ŝian kredon profunda. Ambaŭkaze temas pri virino randenŝovita kaj malhonorinda kiu pli malfrue ja parolas vortojn profetajn - per kiuj ili atingas la korojn kaj ebenigas la vojon je sanigo kaj savo.
Ĝis nun virinoj randenŝovatas kaj iliaj voĉoj ignoratas. Eĉ en niaj eklezioj ni ade kulpigas nin pri kulturaĉo de plimalaltrangigo de virinoj. Kie ajn kristanoj komprenas tiukuntekste sian malbonagon, ili ekkonas pli klare kiom terura estus perforto kontraŭ virinoj kaj infanoj, kiuj el la domoj per forto delokatas iĝonte viktimoj de internacia komercado per uloj. Ili kaj kun ili multaj laborelmigrintinoj ne malofte nehome traktatas kaj oni rifuzas doni al ili la plej bazajn homajn rajtojn. Dum la lastpasintaj jaroj la eklezioj en Indonezio engaĝiĝis kune kontraŭ la komercado per homoj kaj la seksuma misuzo de infanoj. Iliaj klopodoj kiel ankaŭ la faroj de anoj de aliaj religioj estas ju pli necesaj, des pli grandiĝas la nombro de viktimoj en kelkaj landopartoj kvazaŭ ĉiutage.
Se kristanoj preĝas kune legante la Biblion kaj vere atentante la voĉon de Dio, ili povas malkovri, ke Dio parolas eĉ hodiaŭ per la voĉoj de tiuj kiuj konfrontiĝas pri la plej granda sufero. Malsole aŭskultante la voĉon de Dio ili kuraĝiĝas kunlabori en la batalo kontraŭ perula komercado kaj aliaj krimoj.

***Preĝo:***

Dio gracoplena,
Vi estas la fonto de homa digneco.
Danke al Via graco kaj potenco la vortoj de Hanna mildigis la koron de la sacerdoto Eli.
Per Via graco kaj potenco la vortoj de la kanaanino kortuŝis Jesuon kaj li sanigis ŝian filinon.
Donu al ni - en nia klopodo videbligi la unuecon de la Eklezio - la kuraĝon reĵeti ĉiajn ajn formojn de perforto kontraŭvirina.
Helpu al ni dignigi la spiritajn talentojn kiujn virinoj venigas en la servon poreklezian.
Pro tio ni petas Vin per Jesuo Kristo nia Sinjoro kiu en la unueco de la Sankta Spirito vivas kaj regas kun Vi porĉiam.
Amen

**TAGO 8-a:**
**LA ETERNULO ESTAS MIA LUMO KAJ MIA SAVO (Psa 27,1)**

***Legaĵoj:***

**Psa 27, 1-4**

La Eternulo estas mia lumo kaj mia savo; kiun mi devas timi?
La Eternulo estas la forto de mia vivo; kiu povas min teruri?
Kiam alproksimiĝos al mi malbonfarantoj, por manĝi mian karnon,
Miaj kontraŭuloj kaj malamikoj, ili surpuŝiĝos kaj falos.
Se elpaŝos kontraŭ min armeo,
Mia koro ne ektimos;
Se leviĝos kontraŭ min milito,
Ankaŭ tiam mi havos fidon.
Nur unu aferon mi petas de la Eternulo, nur tion mi deziras:
Ke mi restu en la domo de la Eternulo en la daŭro de mia tuta vivo,
Por rigardi la ĉarmon de la Eternulo, admiri Lian templon.

**Joh 8, 12-20**

Jesuo denove parolis al ili, dirante: Mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo. La Fariseoj do diris al li: Vi atestas pri vi mem; via atesto ne estas vera. Jesuo respondis kaj diris al ili: Kvankam mi atestas pri mi mem, tamen mia atesto estas vera; ĉar mi scias, de kie mi venis, kaj kien mi iras; sed vi ne scias, de kie mi venis, nek kien mi iras. Vi juĝas laŭ la karno; mi juĝas neniun. Tamen, eĉ se mi juĝas, mia juĝo estas vera; ĉar mi ne estas sola, sed mi kaj la Patro, kiu min sendis. Estas ja skribite en via leĝo, ke la atesto de du homoj estas vera. Mi estas atestanto pri mi mem, kaj la Patro, kiu min sendis, atestas pri mi. Ili do diris al li: Kie estas via Patro? Respondis Jesuo: Vi konas nek min, nek mian Patron; se vi konus min, vi konus ankaŭ mian Patron. Tiujn vortojn Jesuo parolis en la trezorejo, dum li instruis en la templo; kaj neniu arestis lin, ĉar lia horo ankoraŭ ne venis.

***Medito:***

Dum la sinsekvo de la ok tagoj de ĉi tiu Semajno de preĝo por la unueco, la ĉiutagaj primeditoj evidentigis multenombrajn malfacilajn situaciojn, kiuj defias nuntempe la mondon: la avidon, la perforton, la forlasitecon, la ekspluatadon, la malriĉecon, la poluadon, la malsaton kaj la ŝakradon de homaj estuloj. La eklezioj en Indonezio konscias pri ĉi tiuj defioj, kiuj rilatas ĉiujn kristanojn; ili agnoskas kaj konfesas, ke kelkaj el ĉi tiuj pekoj malhonorigis ankaŭ la vivon de iliaj eklezioj, vundante la unuecon kaj malfortigante ilian atestadon antaŭ la mondo. Samtempe, ili agnoskas ankaŭ la plurajn kaj esperigajn postulojn de la eklezioj, kiuj kuniĝas por atesti sian unuecon en Kristo. La kristanoj de la aliaj mondopartoj povas mencii multajn similajn ekzemplojn en siaj medioj.

Tagon post tago, jaron post jaro, kaj precipe dum la Preĝ-semajno por la unueco, la kristanoj kunvenas por preĝi kune, por konfesi sian komunan baptan fidon, por aŭskulti la dian voĉon en la Skriboj kaj por kune preĝi por la unuiĝo de la Korpo de Kristo. Tion farante, ili agnoskas, ke la Tre Sankta Triunuo estas la fonto de ĉiu unuiĝo, ke Jesuo estas la Lumo de la mondo kaj ke li promesis la lumon de la vivo al tiuj, kiuj sekvas lin. La multaj maljustaĵoj en la mondo ofte malgajigas kaj indignigas ilin, sed ili ne perdas la esperon, eĉ ili estas instigataj

al la agado. De kiam la Sinjoro estas ilia lumo, ilia savo, ilia roko en la vivo, ili ne timas ian malbonon.

***Preĝo:***

Ho Dio nia roko,
ni dankas vin ĉar, per via boneco,
vi subtenas nin dum la elprovo,
kaj montras vian lumon en la mallumo.
Transformu nian vivon, por ke ni povu
esti beno
por nia proksimulo.
Helpu nin travivi la unuecon en la malsameco kiel atestadon de la komunio kun vi,
Patro, Filo kaj Sankta Spirito,
ununura Dio en la jarcentoj de jarcentoj.
Amen

## LA EKUMENA SITUACIO EN INDONEZIO

### *Enkonduko*

Indonezio estas plurisma socio, hejmo por homoj el multaj triboj, lingvoj, kulturoj kaj religioj. El loĝantaro de 265 milionoj, ĉirkaŭ 12% estas katolikoj kaj protestantoj. Kristanismo unue venis al Indonezio tiel frue kiel la sepa jarcento, alportita de la nestorianoj al Norda Sumatro; sed ĝi ne supervivis. Post tio, la evangelion alportis katolikaj misiistoj kiuj sekvis post portugalaj negocistoj en la fruaj jaroj de la 16-a jarcento. Inter ili estis la jezuito Sankta Francisko Ksavero, kiu laboris en la insuloj Maluku de 1546 ĝis 1547. La unua bapto estis en Mamuja, Halmahera, en 1534. En 1605 la nederlandanoj, sub la flago de komerca konglomeraĵo nomata la Verenigde Oost-Indische Compagnie (VOC, la Nederlanda Orient-hinda Kompanio), elpelis la portugalojn el Indonezio. Kun la alveno de ĉi tiuj nederlandaj negocistoj, protestantismo estis enkondukita en Indonezion kaj katolikoj estis devigitaj konverti sin al protestantismo.

Komence, la VOC interesiĝis pri la akiro de spicoj kiuj estis plejparte produktataj en la orienta parto de Indonezio. En la sekvintaj jaroj, la VOC ankaŭ reprezentis la nederlandan kolonian registaron kaj enkondukis la kalvinisman protestantismon praktikatan de la eklezioj en Nederlando en la 17-a jarcento. La Reformita Eklezio estis la oficiala ŝtata eklezio, kaj tial havis specialajn privilegiojn.

Postaj misiistoj kiuj venis al Indonezio, plejparte el Nederlando kaj Germanio, limigis sin per laboro ĉe iu tribo. Rezulte, kristanaj dividoj kutimas sekvi tribajn limojn. La plimulto de kristanaj komunumoj uzis la lingvon de la tribo en siaj Diservoj, sed laŭpaŝe ili ankaŭ adoptis la nacian lingvon 'Bahasa Indonesia'. Kun la veno de kristanismo de la Evangeliisma Reviviĝo kaj la Karismeca Movado al Indonezio en la lasta jarcento kaj, pli lastatempe, la alveno de ortodoksa kristanismo, la eklezioj en Indonezio prezentas larĝan gamon de kristanaj tradicioj, inter ili katolikismo, luteranismo, la eklezioj reformita, pentekostisma, evangeliisma kaj karismeca, baptistoj, adventistoj de la sepa tago, la Savarmeo, kaj ortodoksuloj.

Laŭ diversaj manieroj, ĉi tiuj eklezioj kunlaboras per diversaj platformoj por trakti aferojn kiuj rilatas al la unueco de la Eklezio kaj ankaŭ oftaj zorgoj en la socio, ĉe la niveloj loka, regiona kaj nacia. Virinoj de diversaj kristanaj komunumoj en la distrikto Kebayoran de Ĝakarto, ekzemple, kunlaboras por provizi tre malkarajn pakitajn lunĉojn al la becak-ŝoforoj (rikiŝistoj), familioj kun malaltaj salajroj, kaj la senhejmuloj. Ili havas regulajn renkontiĝojn de frateco, kaj kune kun aliaj virinaj grupoj en diversaj lokoj, observas la Mondan Tagon de Preĝado ĉiujare por preĝi por paco kaj justeco en la komunumo.

### *La Komunumo de Eklezioj en Indonezio*

Persekutuan Gereja-gereja di Indonesia (PGI), la Komunumo de Eklezioj en Indonezio, estas kunularo de la protestantaj eklezioj en Indonezio. Ĝi esti fondita kiel Dewan Gereja-gereja di Indonesia (DGI), la Konsilio de Eklezioj en Indonezio, je la 25-a de majo 1950 kun la celo unuigi la ekleziojn en Indonezio. Eĉ antaŭ la Dua Mondmilito, la ideo havi konsilion de eklezioj estis delonge prirevata, precipe kun la tasko kunordigi la laboron de diversaj misiaj organizaĵoj en Indonezio. Inspiritaj de la sendependiĝo de la lando en 1945, la eklezioj en multaj partoj de la lando sentis sin devigataj esprimi sian unuecon. En sia 10.a Ĝenerala Asembleo en Ambon en 1980, la DGI ŝanĝis sian nomon al Persekutuan Gereja-gereja di Indonesia (PGI). La membroj de la Konsilio estis atingintaj la punkton kie, kunlaborinte dum kelkaj jaroj, ili devis profundigi kaj fortigi sian kunulecon kaj iri preter organizajn aferojn en

komunan sindevigon kiel komunumo de eklezioj, kunlaborantaj per konkretaj metodoj por antaŭenigi la unuecon de la eklezio kaj proklami la evangelion en la kunteksto de plurisma indonezia socio.
Estis dum ĉi tiu Asembleo en 1980 ke la PGI produktis „Kvin dokumentojn de eklezia unueco“ kiuj konsistas el: (1) Komuna alvoko de la eklezioj en Indonezio, (2) Komuna kompreno pri la kristana kredo, (3) Komuna agnosko kaj akcepto inter la eklezioj en Indonezio, (4) Statutoj, (5) Al memstareco pri teologio, rimedoj kaj financo de la eklezioj en Indonezio. Ĉi tiuj dokumentoj reflektas la teologian kaj ekleziologian komprenon de la membroeklezioj konsidere pri ilia komuna strebo al la unueco de la eklezio, manifestita en konkretaj programoj por renovigi, evoluigi kaj unuigi la ekleziojn. Ĉi tiuj dokumentoj ĉiam estas kontrolataj de la Ĝenerala Asembleo de PGI kiu okazas ĉiun kvinan jaron. La 13-a Ĝenerala Asembleo de la PGI en 2000 decidis antaŭeniri kaj akcepti ĉi tiujn kvin dokumentojn kiel la unu unuecigan dokumenton kaj nomi ĝin: „Dokumen Keesaan Gereja“ (DKG) - Dokumento de eklezia unueco. Oni atendas, ke ĉi tiu dokumento funkcios kiel la ĉefa referencopunkto por la PGI-membroj dum ili kunlaboras por la unueco de la eklezioj kaj por komuna kristana atestado en Indonezio. Ĉi-momente, PGI havas 89 membroekleziojn, interalie pentekostismaj, evangeliisma kaj karismecaj. Ankaŭ estas provincaj PGI-oj, inter ili pli malgrandaj eklezioj kaj eklezioj bazitaj en la regionoj.

Temp-al-tempe, la PGI eldonas laŭtemajn publikajn komunikaĵojn aŭ sendas leterojn al la registaro de la Indonezia Respubliko responde al iuj gravegaj aferoj en la socio, inter ili la efektivigo de religia libereco kaj kampanjado por justeco kaj paco, precipe por la marĝenigitoj. Simile, la PGI sendas pastrajn leterojn al siaj membroeklezioj pri gravegaj aferoj en Indonezio, kiel religia libereco, korupto, malobservoj de homaj rajtoj, perforto, la protekto de infanoj, ktp. La 16a Ĝenerala Asembleo de PGI en 2014 okazis kun la temo “Dio, el la abismoj de la tero Vi denove min eligis (Psa 71,20): Solidarece kun ĉiuj idoj de la lando, ni kune plenumas la valorojn de Pancasila por venki malriĉecon, maljustecon, radikalismon kaj ekologian detruon. Tiu temo gvidis la laboron de PGI kaj ĝiaj membroj specife por la periodo 2014-2019. La membroeklezioj de PGI kundividas la konvinkon ke avareco estas la fundamenta kaŭzo de la kvar diversaj sed interrilataj aferoj supre menciitaj. Tial PGI popularigas la tiel nomitan „spiritualitas keugaharian“ aŭ „spiritualeco de modereco.“

### *Katolikismo en Indonezio kaj la konferenco de katolikaj episkopoj*

Malgraŭ fruaj misiistaj sukcesoj en la 16-a jarcento, katolikismo estis subpremita dum la nederlanda regado ĝis la jaro 1807, kiam politikaj eventoj en Eŭropo denove ebligis al katolikoj religian liberecon. Romkatolikismo do ekzistis nur en limigita formo ĝis la dua duono de la 19-a jarcento kaj la 20-a jarcento, kiam novaj misiistaj klopodoj fondis lernejojn, seminariojn kaj novajn religiajn komunumojn. La unuaj indiĝenaj indoneziaj sacerdotoj estis ordinitaj en la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento kaj unu el tiuj sacerdotoj, patro Albertus Soegijapranata, SJ, iĝis la unua indiĝena episkopo en la jaro 1940. Li estis iuspeca nacia heroo, ĉar li subtenis indonezian sendependecon. Li estas konata pro sia devizo: „100 procente katolika, 100 procente indonezia.“
La konferenco de indoneziaj katolikaj episkopoj estis unue fondita en la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento kaj poste refondita en la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento por inkludi episkopojn de ĉiuj partoj de la nov-sendependa ŝtato. Ekde la jaro 1987 ĝi nomiĝas Konferensi Waligereja Indonesia (KWI). La longa ekzistado de la konferenco de indoneziaj episkopoj ebligis al ĝiaj episkopoj grave interveni dum la Dua Vatikana Koncilio (1962-1965). Ili ĉefe kontribuis al la dokumento de la Koncilio pri Revelacio. Notindas, ke la unuaj intervenoj de la arkiepiskopo Gabriel Manek el Endeh, Timoro, kontraŭis la unuan proponitan manuskripton De fontibus,

ĉar ĝi povus esti fonto de obstakloj en la dialogo de la Eklezio kun aliaj kristanoj. Ekde la jaro 1962 ni do povas vidi, ke la indoneziaj katolikaj episkopoj engaĝiĝis en la ekumena projekto.

### *Kunlaboro de PGI kaj KWI*

Dum multaj jaroj PGI kaj KWI kunlaboris ĉefe en solvado de komunaj problemoj en la ŝtato. Ekde la jaro 1980 PGI kaj KWI ĉiujare eldonas komunan mesaĝon por Kristnasko. Ili priparolas naciajn problemojn en la lumo de kristnaska evangelio. Ĉi tiu mesaĝo estas legata en parokejoj de katolikaj kaj protestantaj eklezioj. La temo de ĉiujara kristnaska mesaĝo de PGI-KWI estas akceptita en la tuta lando. Unu de la problemoj, pri kiuj ambaŭ organizoj parolas, rilatas al realigo de religia libereco por ĉiuj civitanoj, kiel tion garantias la Konstitucio de la respubliko de Indonezio. Kiam bezonate, PGI kaj KWI eldonas publikan deklaron pri la ekestintaj problemoj en la socio, kiuj endanĝerigas justecon kaj pacon en la komunumo kaj bonetoson de la homoj.

Eklezioj en Indonezio konscias, ke gravas konstrui kaj plifortigi rilatojn kun homoj de aliaj kredkonfesoj. PGI kaj KWI engaĝiĝas en la interreligia dialogo kaj kunlaboro. Ambaŭ organizoj aktive partoprenas en la kunlaboro de diversaj religiaj organizoj en Indonezio, kiu agnoskas ses oficialajn religiojn, nome: islamo, protestanta kristanismo, katolika kristanismo, budhismo, hinduismo kaj konfucianismo. Religiaj gvidantoj de ĉi tiuj religioj renkontiĝas de tempo al tempo por priparoli gravajn problemojn kaj ili ofte eldonas komunan deklaron pri la konkretaj problemoj. En la loka nivelo multaj komunumoj kaj parokoj ligitaj kun PGI kaj KWI ankaŭ aktive engaĝiĝas en interreligia dialogo kaj konkreta agado en la socio.

### *Indonezia kristana forumo*

Indoneziaj partoprenantoj ĉeestis la unuan renkontiĝon de Global Christian Forum (GCF) en Limuru, Kenjo en la jaro 2007. Ili estis inspiritaj plifortigi la kunlaboron inter diversaj kristanaj tradicioj en la lando. En la jaro 2012 la dua renkontiĝo de GCF okazis en Manado, Indonezio. Dum ĉi tiu aranĝo kristanaj gvidantoj reprezentantaj diversajn tradiciojn en Indonezio fondis Forum Umat Kristen Indonesia (FUKRI), Indonezian Kristanan Forumon. Membroj de ĉi tiu forumo aktive partoprenis en la celebrado de kristana unueco, kiu okazis en Senayan stadiono en Jakarto en la jaro 2013. Ĝi estis speciala aranĝo, kiu bonvenigis la 10-an asembleon de la Monda Konsilio de Eklezioj (WCC) en Busan, Suda Koreio. En la renkontiĝo partoprenis la ĝenerala sekretario de WCC, rev. Dr. Olav Fykse Tveit kaj la loka organiza komitato de la 10-a asembleo de WCC en Busan, Suda Koreio.

Ekde tiam membroj de FUKRI, kiu konsistas el Komunumo de Eklezioj en Indonezio (PGI), Konferenco de katolikaj episkopoj (KWI), Komunumo de evangelianaj eklezioj kaj institutoj en Indonezio (PGLII), Komunumo de pentekostaj eklezioj en Indonezio (PGPI), Komunumo de baptistaj eklezioj en Indonezio, La Armeo de Savo, Adventistoj de la sepa tago kaj Ortodoksa eklezio, regule renkontiĝas ĉiumonate. Unue ili renkontiĝis nur por konstrui fratecon, sed post iom da tempo iliaj diskutoj profundiĝis kaj fokusiĝis al la loko de kristanoj en pluralisma kaj rapide ŝanĝanta socio de Indonezio. Kune kun la Nacia reto de preĝoj FUKRI organizas preĝ-aranĝojn, kiuj fokusiĝas je problemoj en la socio kaj en la vivo de la nacio. FUKRI ankaŭ rememorigis la 500-an datrevenon de la Reformacio. Antaŭnelonge FUKRI pridiskutis dokumenton eldonitan per WCC, Papa Konsilio por antaŭenigi kristanan unuecon kaj Monda Evangeliana Alianco pri „Kristana atesto en la mult-religia mondo: Rekomendoj por konduto“. Membroj de FUKRI aprezis ĉi tiun ekumenan dokumenton kiel valoran gvidlibron por la eklezioj en Indonezio, kiuj atestas en la pluralisma socio. FUKRI donis ĉi tiun dokumenton al siaj membroj por studado.

## KELKAJ GRAVAJ DATOJ ŜLOSILAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

**ĉ. 1740**: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj
**1820**: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito" (Hints for the outpouring of the Spirit)
**1840**: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco"
**1867**: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
**1894**: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
**1908**: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio" en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
**1926**: La Movado „Fido kaj Konstitucio" komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj" okaze de Pentekosto
**1935**: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras"
**1941**: Komisiono „Fido kaj Konstitucio" translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
**1958**: La Ekumena centro „Kristana unueco" el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
**1964**: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu"(Joh 17, 21)
**1964**: La „Dekreto pri ekumenismo" de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
**1966**: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
**1968**: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio" kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
**1975**: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio
**1988**: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
**1994**: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
**2004**: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
**2008**: n la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
**2010**: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

## PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ
## TEMOJ 1968-2017

*En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj.*

**1968**: Por laŭdo de Lia gloro (Efe 1,14)
**1969**: Vokitaj al libereco (Gal 5,13) (Prepara kunsido en Romo, Italio)
**1970**: Ni estas kunlaborantoj kun Dio (1 Kor 3,9)
(Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, Federacia Respubliko Germanio)
**1971**: ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (2 Kor 13,13)
**1972**: Novan ordonon mi donas al vi (Joh 13,34) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
**1973**: Sinjoro, instruu nin preĝi (Luko 11,1)
(Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)
**1974**: Ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (Fil 2,1-13)
(Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
**1975**: La celo de Dio: sumigi en Kristo ĉion (Efe 1,3-10)
(Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en en Ĝenevo, Svislando)
**1976**: Ni estos similaj al li; (1 Joh 3,2) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas
(Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. Prepara kunsido en Romo, Italio)
**1977**: Kune elteni en espero (Rom 5,1-5)
(Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)
**1978**: Jam ne fremduloj (Efe 2,13-22) (Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)
**1979**: Servu unu al la alia por la gloro de Dio (l Pet 4,7-11)
(Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
**1980**: Venu via regno (Mat 6,10)
(Materialo de ekumena grupo en Berlino, GDR, prepara kunsido en Milano)
**1981**: Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo (1 Kor 12,3b-13)
(Materialo de Graymoor Fathers, Usono – prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
**1982**: Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (Psa 84)
(Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)
**1983**: Jesuo Kristo – la Vivo de la Mondo (1 Joh1,1-4)
(Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en Céligny (Bossey), Svislando)
**1984**: Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro (1 Kor 2,2 kaj Kol 1,20)
(prepara kunsido en Venecio, Italio)
**1985**: De morto al vivo kun Kristo (Efe 2,4-7)
(Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp, Svislando)
**1986**: Vi estos miaj atestantoj (Ago 1,6-8)
(Materialo el Jugoslavio/Slovenio, prepara kunsido en Jugoslavio)
**1987**: Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo (2 Kor 5,17-6:4a)
(Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)
**1988**: La amo de Dio elĵetas timon (1 Joh 4,18)
(Materialo el Italio - prepara kunsido en Pinerolo, Italio)
**1989**: Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo (Rom 12,5-6a)
(Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge, Anglio)
**1990**: Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kredu (Joh 17)
(Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)
**1991**: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj! (Psa 117 kaj Rom 15,5-13)
(Materialo el Germanio - prepara kunsido en Rotenburg der Fulda, FR Germanio)
**1992**: Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (Mat 28,16-20)
(Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)
**1993**: Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj (Gal 5.22-23)
(Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)
**1994**: La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense (Ago 4,23-37)
(Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)

**1995**: Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia (Joh 15,1-17)
(Materialo el Fido kaj Konstiucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)
**1996**: Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (Apo 3,14-22)
(Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)
**1997**: Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio (2 Kor 5,20)
(Materialo de Nordia Ekumena Konsilantaro, prepara kunsido en Stokholmo, Svedio)
**1998**: La Spirito helpas nian malfortecon (Rom 8,14-27)
(Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)
**1999**: Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo (Apo 21,1-7)
(Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĥejo de Bose, Italio)
**2000**: Benata estu Dio kiu benis nin en Kristo (Efe 1,3-14)
(Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna)
**2001**: Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (Joh 14,1-6)
(Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)
**2002**: Ĉe Vi estas la fonto de vivo (Psa 36,5-9)
(Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)
**2003**: Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj (2 Kor 4,4-18)
(Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)
**2004**: Mian pacon mi donas al vi (Joh 14,23-31)
(Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Sicilio)
**2005**: Kristo, unika fundamento de la Eklezio (1 Kor 3,1-23)
(Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Piestaňy, Slovakio)
**2006**: Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (Mat 18,18-20)
(Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)
**2007**: Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli (Mar 7,31-37)
(Prepara materialo el Sud-Afriko – kunsido en Faverges, Francio)
**2008**: Preĝu senĉese (1 Tes 5, 12a.13b-18)
(Prepara materialo el Usono – kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)
**2009**: Ke ili fariĝu unu en Via mano (Eze 37,15-28)
(Prepara materialo el Koreio – kunsido en Marsejlo, Francio)
**2010**: Vi estas atestantoj pri tio (Luk 24,48)
(Prepara materialo de Skotlando – kunsido en Glasgovo, Skotlando)
**2011**: Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (Ago 2,42) (Prepara materialo el Jerusalemo – kunsido en Saydnaya, Sirio)
**2012**: Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (1 Kor 15, 51-58)
(Prepara materialo el Pollando – kunsido en Varsovio, Pollando)
**2013**: Kion la Sinjoro postulas de ni (Miĥ 6, 6-8)
(Prepara materialo el Hindio – kunsido en Bengaluro, Hindio)
**2014**: Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17)
(Prepara materialo el Kanado – kunsido en Montrealo, Kanado)
**2015**: Donu al mi trinki (Joh 4,7)
(Prepara materialo el Brazilo, kunsido en São Paulo)
**2016**: Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio(kp. 1 Pet 2,9)
(Prepara materialo el Latvio – kunsido en Riga)
**2017**: La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo (kp. 2 Kor 5, 14-20)
(Prepara materialo Germanio)
**2018:** Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto (Eli 15,6)
(Prepara materialo – Karibio)